



BONA ESPERO



Cirkulero 61

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.

prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein

☎ +49-(0)2902-57460 ★ 📠 +49-(0)2902-911323 ★ 📧 u.nelken@t-online.de

Warstein, 2003-12-12



Karaj geamikoj kaj subtenantoj,

kvazaŭ kiel malgranda surprizo je kristnasko, la festo honore al infano, ĉifoje la lastaj novaĵoj pri Bona Espero el la perspektivo de ties junaj enloĝantoj:

„Karaj geamikoj en malvarma Eŭropo, la infanoj de Bona Espero ĉirkaŭbrakas vin! El nia varma printempo al vi ĉiuj niajn plej amikajn salutojn!

Okaze de la baldaŭa Kristnasko ni estas preparantaj la plej belan feston, kiam ni infanoj prezentos la naskiĝon de Jesuo kaj niaj geonkloj, espereble...preparos belan donacon por ĉiu el ni. Kaj krome ni certe havos tre specialan festan manĝon kaj multajn dolĉaĵojn!

Nia plej granda frato, *Adão*, finas nun la duagradan lernejon kaj en la 20-a de decembro estos sia diplomfestoj! Ni ĉiuj vojaĝos al Alto Paraiso por partopreni tiun grandan momenton, kiun ni ĉiuj deziras post multaj jaroj ankaŭ por ni. Li laboras

dumtage en bela hotelo en la akceptejo kaj lernas vespere.

Emanoelle nun estas 18jara, mankas du jaroj por fini la duagradan lernejon, kaj ankaŭ ŝi jam trovis dum la semajnfino laboron en turisma centro, kie ŝi vendas en eleganta vendejo lokajn produktojn kaj memoraĵojn el kristalo.

Aline, 17jara, lernas jam de unu jaro kun *Emanoelle* kaj loĝas ankaŭ en nia urba domo; ŝia patrino mortis antaŭ unu monato, kiam ŝi devis naski la naŭan kaj la dekan infanon, du ĝemeloj! Kaj nun? La kvar lastaj beboj vivas kun la dua edzo, la ses pli aĝaj de alia patro, estas komplete forlasitaj, ĉar ties patro jam de jaroj malaperis.

Ĉiuj ses do estas kandidatoj por Bona Espero; *Renato*, 13jara vivas en rulseĝo pro poliomyelito kaj zorgas pri li la pli junaj fratoj. Vera tragedio en kampara regiono je 70 km de Alto Paraiso, sen akvo kaj sen elektro... Nuntempe ĉiuj estas en nia urba hejmo, ankaŭ la sesjara *Iuselia*.

donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12)

kasistino: Dagmar Rahn, Hirschfeldstr. 3, D-59581 Warstein, ☎+49-(0)2902-700330, 📠+49-(0)2902-700328

Murielle alvenis el Cavalcante, forlasita, senpatra, la patrino laboras kiel servistino, dumtage maljunaj najbaroj misuzis ŝin. Naŭjaraĝa. La prokuroro petis protekton por ŝi. Kune tuj venis pliaj du forlasitaj knaboj.

Ŝajne la mizero en Brazilo daŭre kreskas kaj infanoj en danĝero plimultiĝas. Kaj la zorgantoj de infanoj malaperadas...

Gloria kaj Moacir ne rezistis la streĉan respondecon kaj forvojaĝis por pluraj monatoj ek de oktobro. En junio jam kvar pagitaj voluntuloj kverelis kun Moacir kaj foriris. Restis tro malmultaj, kaj onklo Giuseppe kaj onklino Ursula devis reveni el sia ripozperiodo.

En la lastaj monatoj estis nur du eŭropaj voluntuloj, Patrick Etienne el Francio kaj Carlin Brugger el Germanio, ambaŭ tre simpatiaj kaj kunlaboremaj! Venontan semajnon alvenos Aneta Ubik el Germanio.

Niaj geonkloj Giuseppe kaj Ursula rakontis al ni multajn epizodojn de sia vojaĝo en Eŭropo kaj ni vidis la fotojn interesajn. Tre amuzaj tiuj de la festa promenado en la Esperanto-aŭtobuso dum la jubileo de la bierfabriko "Warsteiner"!

Ni lernis tre multe ĉi-jare en la lernejo kaj ĉiuj estas promociataj al la venonta klaso. Nia instruistino *Adarci* estas tre laca, ĉar ŝi multe instruas nin. Sed ĵus ŝi gajnis grandan premion:

El inter 27 instruistinoj ŝi estis elektita, kune kun aliaj kvar, por

viziti lernejojn en Argentino dum la monatoj marto kaj aprilo. Estas speciala eduka programo de Rotary International, kiu pagos la tutan vojaĝon.

Clarimundo, nia fama *Tota*, venontjare finos la universitatajn studojn. Kaj li revas pri la invito al Germanio, kiel diris familio Bohr, por partopreni en la PSI evento [Printempa Semajno Internacia] venontjaren aprilon!



Ni ĉiuj tre ĝojis pri la nova, bela aŭtomobilo! Ĝi alvenis kiel donaco de la blinda prezidanto de la itala Esperanto-ligo. La monon por tio kolektis multaj Esperantistoj dum festo de lia 25-a datreveno de lia geedziĝo. Tio estis ne atendita antaŭtempa kristnaska donaco por ni. Nun ni denove sen problemoj povas veturi al Alto Paraíso kaj reen ekz. pro la supera lernejo. Ĉi-tio bedaŭrinde ĉiam pli ofte ne eblis per la alia aŭto.

Fine ni volas rakonti al vi, ke ni antaŭĝojas speciale pro evento je la 12-a de decembro: tiam la urbo Alto Paraíso festos sian 50-an jubileon, kaj ni infanoj prezentos nin diversmaniere kune kun onklino Ursula, kiel honora civitano de la

urbo, kaj kun multaj fremdlandaj gastoj.”

Kaj tuj poste ĉi-tie la letero de Tota (Clarimundo), promesita jam en la lasta rondletero. Ankaŭ li ja vivis iam kiel infano en Bona Espero:

“Mi jam kiel infano komprenis ke Esperanto estas granda solvo de la interkompreniĝo en la mondo. En la UK en Fortaleza mi havis la konfirmon de mia revo kaj vidis ke Esperanto vere funkcias sen problemoj. Mi iomege timis kiam la aviadilo supreniris kvankam flugi de multaj jaroj mi deziris!

Admiri la maron en la vespero estas grandioza spektaklo... Mi ege dankas al la germanaj Esperantistoj, kiuj helpis al la bonesperanoj havi tiun ŝancon.

Jam de monatoj ni daŭre studas la eblecon veturi per aŭtoj kaj kombio al la Nacia Kongreso. Ni vidos. Mi nuntempe studas en la universitato en Brazilia administradon danke al la helpo de jaroj de BE. Mi laboras en la radiostacio en la programigo de klasikaj muzikoj, kaj tiel povas financi mian kurson, kiu estas tre multekosta, sed mi sukcesis ricevi financan helpon de la ministerio por edukado kaj poste devas redoni la monon.

Mi laboras de la 7a ĝis la 13a horo en la radio, kaj de la 14a ĝis 18a ĉe televidproduktado de Dr. Ulisses, kiu post la UK en Fortaleza dediĉas sin al produktado de tv-filmoj pri Esperanto, pri Bona Espero, pri paco, kurso de Esperanto en TV k.t.p., kaj mi estas lia Esperanto

fakulo kaj jam lernis produkti filmojn.

De la 19a ĝis la 23a horo mi estas en la universitato, do restos malmultaj horoj por dormi. Mi dormas en studenta hejmo en la centro de Brazilia.

Mi estas jam en la kvara jaro de la studoj kaj tre kontenta povi veturi al Bona Espero dufoje monate dum la semajnfino!

Ada estas la unua infano de BE kiu finis universitatan kurson, Edith la dua kaj mi la tria. Ne estas facila sed...ebla se oni volas!”

Nun finfine la kutimaj suplementoj el nia perspektivo:

La jaro 2003 estas neforgesebla al la nuna estraro ĉefe pro unu kialo: Estis ja dum ĉi-tiu somero Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia unuafoje ties gastoj, kaj eĉ ses tagojn! Dume okazis impresa renkonto en Warstein kun multnombraj subtenantoj de Bona Espero, kiuj ege ĝuis tiun eventon kune kun nia paro.



de maldekstre: Mia Böhmer, Marit Bohr, Petra kaj Bernd Schönberner, Ilona Bohr, Ursula kaj Giuseppe ĉe la renkonto en Warstein

Povis ni ĝoji ĉijare pri la vizito de Ursula kaj Giuseppe ni faras tion – jam nun en la formo de anticipa ĝojo – pri la supozeble multe pli longdaŭra vizito de same jam sufiĉe sukcesa Tota venontjare, invitita de Ilona kaj Wolfgang Bohr, unu el la organizantoj de la PSI. Kiel certe bonvena gasto li povos saluti dum sia planita rondvojaĝo ne nur espereble laŭeble plej multajn de vi, sed ankaŭ multnombrajn aliajn Esperantistojn. Mi opinias: pli bonan reprezentanton por nia Bona Espero ol ĉi-tiu personigita pozitiva rezulto de viaj multjaraj fidelaj, sukcesplenaj kunlaboro kaj helpopreteco ni apenaŭ povas deziri al ni!

Cetere la longdaŭra intereso por Bona Espero sinĉese daŭras: "le monde de l' ESPERANTO" (sept./okt. 03), franca Esperanto revuo, informas kaj sur la titolpaĝo kaj ene de la ĵurnalo pri la ĉiutaga vivo en Bona Espero per bone elektitaj fotoj kaj artikolo. Ne nur Esperantistoj, ankaŭ ekster Germanio petas plue ne malofte informojn pri nia lerneja bieno.

Denove kiel anstataŭanto por ĉiuj aliaj subtenantoj, mi ŝatas danki Mia Böhmer el Krefeld, la senlacan aktivulinon. Sed antaŭ ĉio mi korege gratulas ŝin pro la distingo per la jam dua grado de la "Bundesverdienstkreuz" antaŭ kelka tempo, dekoraciita ne laste pro ŝiaj longdaŭraj, gravaj meritoj i.a. rilate al Bona Espero. Alia danko koncernas nian viciprezidanton Bernd Schönberner

(la fama magiisto "Don Espero"), kiun mi same gratulas okaze de lia eknomo "Senator" de Meschede, ankaŭ pro liaj daŭre sukcesplenaj agoj por Bona Espero.

Karaj geamikoj, kiel ĉiuj jaroj denove mi diras ankaŭ ĉifoje koregan dankon pro via fidela preteco donaci. Ĉiujn novajn donacintojn, kiujn mi kore salutas en nia rondo, mi petas same ankaŭ plue subteni la infanojn el Bona Espero.

Ankaŭ nome de ĉiuj junaj kaj maljunaj Bonesperanoj kaj de la tuta estraro mi deziras al ĉiuj de vi

*benitan kristnaskon
same kiel
feliĉan novjaron!*

Otto Vek

